**T A G I Ĝ O**

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASILIA

Caixa Postal 04-0406
70000 BRASÍLIA (DF)
Tel. 226-1298

- A P R I L O 1 9 8 1

## - LA ĜENERALA DIREKTORO DE UEA EN BRASÍLIA

D-ro Victor Sadler alvenis en nian ĉefurbon la 3-an de aprilo por dusemajna restado en Brazilo cele al difino de la programo de la 66-a U.K.

Dum pluraj kunvenoj kun la Loka Kongresa Komitato, ĉiuj detaloj de tiu ampleksa programo estis pridiskutitaj kaj oni jam difinis horarojn kaj lokojn kie efektiviĝos la unuopaj programeroj.

Dimanĉon la 12an de aprilo, D-ro Sadler estis invitita de Taguatinga Esperanto-Rondo (TERO) kaj havis la eblecon konstati, ke agado por Esperanto viglas ankaŭ en la plej granda antaŭ-urbo de Brasília.

Mardon la 14-an de aprilo, sub aŭspicioj de la Komerca Federacio de Brasília, okazis ĉe Hotelo Carlton gazetara konferenco cele al prezentado de nia kongreso. Ĉeestis la manifestacion Senatano José Lins de Albuquerque, prezidanto de LKK, D-ro Newton Rossi, prezidanto de la Komerca Federacio, D-ro Sadler kaj aliaj membroj de LKK. La ĉeestantaj ĵurnalistoj interesiĝis pri la temo kaj starigis plurajn demandojn. El tio rezultis artikolo en "Correio Brasiliense" kaj televida intervjuo al Senatano José Lins kaj al D-ro Sadler en la populara " Jornal Hoje" de TV-Globo.

La gasto forlasis nian urbon la 15an de aprilo, sed li promesis reveni je la fino de julio kun almenaŭ 1.500 eksterlandaj .....geamikoj !

---

<u>MEMBROJ 1981 de nia asocio</u> : Responde al nia alvoko, kelkdeko da membroj jam renoviĝis sian kotizon por la kuranta jaro. Tamen, la kasisto de nia asocio ankoraŭ ne estas kontenta kaj deziras ankaŭ <u>VIAN</u> aliĝon !

Kiel jam anoncite, la baza aliĝ-kotizo por la jaro 1981 estas :

- Gejunuloj ĝis 25 j. ........... Cr$ 200,00
- Geplenkreskuloj ............... Cr$ 400,00

Gesamideanoj el aliaj urboj, kiuj deziras konstante ricevi "TAGIĜO", rajtas aliĝi laŭ la samaj kondiĉoj. Pri tiu ebleco jam profitis Eléus Leonardo de Sá kaj Francisco Feliciano da Silva, ambaŭ el Ilhéus. Koran dankon!

---

## <u>LA 66-a SENHALTE ALPROKSIMIĜAS</u> !!

Ne eviteble Brasília estos pace invadita de la verda armeo je la fino de julio. Se vi, kara membr(in)o ankoraŭ ne konsciis pri tio, ni amike sugestas al vi poluri vian insignon kaj vian lingvo-konon, aliĝi al la kongreso kaj labori kun ni ĉe la fronto de tiu invado. Ne klopodu ignori la realaĵon !

Se vi estos en la urbo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, la kongreso "persekutos" vin. Ĉie ŝvarmos esperantistoj; ĉe la televido, anstataŭ pri futbalo, oni parolos ekskluzive pri Esperanto ; se vi ne aperos en la kongresejo, ni donos vian adreson al la plej postulemaj kongresanoj por ke ili ĝenu vin hejme ; se vi forlasos la urbon, en la ĉefaj turismaj lokoj de nia lando vi tretos, aŭ estos tretita de esperantistoj ! Vere, vi ne havas alternativon. Konsolu vin la perspektivo ke, dum tiu-ĉi jarcento, la 66-a estos la unua kaj eble la lasta Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Brazilo.

Do, ĝoju kaj suferu kun ni kaj ne klopodu uzi la jam eluzitajn familiajn kaj profesiajn senkulpiĝojn por eviti tiun ĝojan suferadon!

Pli konkrete kaj serioze, ni urĝe bezonas ekipon de akompanantoj por la vizitoj de la urbo, kiuj okazos per aŭtobuso dum la kongreso.

Ni trejnos grupeton de volontuloj, sed unue ni devas elekti ilin. Anoncu vin plej baldaŭ ĉe LKK.

## – PLEJ LASTAJ NOVAĴOJ PRI LA KONGRESO

LA KOTIZO por individuaj membroj de UEA, estas blokita je la nivelo de 80,- nederlandaj guldenoj ( ĉ. Cr$ 2.600,- laŭ la nuna kurzo). Tiun eksterordinaran avantaĝon UEA donas nur al sudamerikaj kongresanoj, kiuj tamen devos nepre aliĝi antaŭ la alveno en Brasília. LKK oficiale informas, ke oni ne garantias senpagan loĝadon al gejunuloj, kiuj aliĝos nur je la alveno en Brasília kaj krome, ne-aliĝintoj, ne rajtos partopreni la kongresajn aranĝojn.

LA KOMUNA LOĜEJO estos je nia dispono nur de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Pli fruaj alvenontoj devos mem prizorgi la loĝadon, krom se ili respondis al nia alvoko pri kunlaborado dum la kongreso. Por tiuj personoj oni planas disponigon de loĝ-eblecoj, laŭ la kondiĉoj, kiuj siatempe oni komunikos al ili.

LA FOTO-KONKURSO de la kongreso akceptas kontribuaĵojn ĝis komence de julio. Foto-amatoroj, rapidu sendi viajn fotojn ( nigre-blankajn aŭ kolorajn laŭ la minimuma formato 13 x 18 cm), sed unue nepre legu la regularon je paĝo 32 de la Dua Oficiala Bulteno de la Kongreso.

INFANOJ DE LA TUTA MONDO, ALIĜU ! Aperis la aliĝilo de la 19-a Internacia Infana Kongreseto, ricevebla ĉe la adreso de LKK. Infanoj 6 – 13 jaraj povos restadi tutan semajnon en Brasília ( kompleta pensiono plus programo), kontraŭ pago de 70,- ned. guldenoj ( ĉ. 2.300,- Cr$) Alvoko al pluraj firmoj por havigi donacojn por la kongresetanoj, jam donis konkretajn fruktojn. Firmoj "Johnson e Johnson" kaj "NESTLE" sendis kvanton de siaj produktoj. Aliĝu viajn infanojn kaj montru, ke nia movado havas brilan estontecon!

KOMERCISTOJ LERNOS ESPERANTON – Dum kunveno ĉe "Asocio de Vendistoj", okazinta la 7-an de aprilo, oni prezentis la kongreson kaj la eblecon, ke la granda vendo-centro "VENANCIO 2000" allogu la kongresanojn por favoraj prezoj kaj precipe per lingva asisto. La ideon kaptis la ĉeestantaj komer-cistoj kaj la asocio instigos siajn membrojn partopreni la intensivajn Esperanto-kursojn ĉe SENAC aŭ, depende de la intereso oni starigos elementan kurson ĉe "VENANCIO 2000".

oooooo
oo

## NOVAJ ESPERANTO-KURSOJ EN BRASÍLIA

– NUCLEO BANDEIRANTE : ĉe " Centro de Desenvolvimento Social" – Elementa kurso gvidata de S-ro Raimundo Francisco de Oliveira. Ĉiusabate je la 16a horo. Inaŭguro la 1-an de majo je la 15,30 h.

– SENAC – EQS 703/903 : Intensivaj kursoj en dek lecionoj – Lunde – merkrede kaj vendrede de la 16a ĝis la 18a h. ( unua vico) kaj de la 20a ĝis la 22a ( dua vico) – Kotizo Cr$ 500,- (inkluzive lerno-tekstoj) – Instruistoj : Giuseppe Grattapaglia kaj Francisco M. de Oliveira. Inaŭguro: lunde la 4an/05

---

ANONCETOJ: – Esperanto-klubo en Ĉeĥoslovakio organizos grandan internacian ekspozicion de infan-pentraĵoj. Aĝo 5 – 15 jaroj ; temo kaj formato libervolaj. Tiucele oni eldonos kolorpresitan katalogon de la plej belaj pentraĵoj. Ĉiu infano ricevos Esperantan dank-ateston kaj multaj ankaŭ la katalogon. Speciale oni recompencos kolektivajn kaj transmarajn sendaĵojn. Pentraĵojn kun surdorsa indiko de nomo aĝo kaj sekso de la aŭtoro, sendu plej baldaŭ al :" Frantisek Patera – Csl. armády 1027 – CS -508 01 HORICE – Ĉeĥoslovakio.

– Nova meksika esperantisto deziras korespondadi kun brazilaj geamikoj: " Alberto Valley A. – Real de los Reyes 77 – Edif. Cedro II – Reyes Cayaacan -MEXICO 21-DF – Meksikio